

 Internacia Fervoĵista Esperanto-Federacio



Rumana Esperanto Fervoĵista Asocio
www.refa2010.wordpress.com

RUMANA FERVOJISTO

Oficiala bulteno de Rumana Esperanta Fervoĵista Asocio



Janŭaro - Aŭgusto 2012
© 2012 REFA



RUMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO (R.E.F.A.)
500024 Braşov, str.Politehnicii nr.1, Rumanio

ADRESARO - 2012

RUMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO (R.E.F.A.)

500024 Braşov, str.Politehnicii nr.1, RO – Rumanio

www.refa2010.wordpress.com

PREZIDANTO, komitatano por IFEF,

s-ino Rodika GIUHAT

B-dul Timișoara nr. 69, bl. C 13, sc.B, et.V, ap.59 Sector 6, 77401 - București

portebla : + 40 766 278 426

(h) : + 40 217 774 165

rete : rodica_giuhat@yahoo.com

VICPREZIDANTO, anstataŭanto de prezidanto, respondeculo pri organizaj aferoj kaj E- instruado,

s-ino Rodika TODOR

B-dul. Valea Cetății nr. 22, bl. B 24, sc.A, ap.5, 500289 - Braşov

portebla: + 40 722 792 849

(h): + 40 368 408 779

rete: rodica_todor@yahoo.com

VICPREZIDANTO, respondeculo pri Faka agado kaj "R.F" ("Rumana Fervojisto

s-ino Silvia Tudor

str. Făt-Frumos nr.1, bl. "S" 29, sc.1, et.8, ap.26, sector 5, București

portebla: +40 745 259 651

(h) +40 214 234 644

rete: silviatudor94@yahoo.com

SEKRETARIO: s-rino Eniko TEGHIU

Str. Urziceni nr. 1, bl. 18, sc.D, ap.9, Brasov

portebla: +40 0761 650 234

rete: teghiueniko@yahoo.com

KASISTO: s-ino Niculina IACOB

Str. Vasile Lascar nr. 18, ap. 20, Sector 2, București

portebla: +40 722 228558

ESTRARANO, respondeculo pri la rilato kun UAAIFR (Landa Sekcio de FISAIC),

s-ro Vasile POPESCU

Str. Ghetariei 15 - Sibiu

portebla: +40 721 110 825

rete: vasilepopescu56@yahoo.com

ESTRARANO, s-ro Marian LUNGEANU

Str. Regimentul 11 Siret nr. 33, Tiglina 1, bl. D5, ap.53, Galati

portebla: +40 0751 968 001

rete: manu_man68@yahoo.com

Por rapida informado:

rodica_giuhat@yahoo.com ; portebla : + 40 766 278 426

rodica_todor@yahoo.com ; portebla: +40 722 792 849



RUMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO (R.E.F.A.)
500024 Braşov, str.Politehnicii nr.1, Rumanio

64a IFEF KONGRESO Herzberg am Harz 19-25 majo 2012



La **64-a kongreso de IFEF**, Internacia Fervojista Esperanto-Federacio, okazis en **Herzberg am Harz** de la **19-a ĝis la 25-a de majo 2012**



Festparolo de Rodica Todor, IFEF prezidantino dum la Solena Malfermo de la 64-a IFK



La estraro de IFEF kunsidas



La prezidantoj de ILEI kaj IFEF laŭtlegas la interkonsenton



Akcepto de la vicurbestro



RUMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO (R.E.F.A.)
500024 Braşov, str.Politehnicii nr.1, Rumanio



La Esperanto - placo



Ekskursantoj ĉe la 125-jara etŝpura fervojo



SimCED

Simulilo de elektrodinamikaj centralizaj instalaĵoj

La SimCED sistemo :

- simulas la relajso-instalaĵon de virtuala stacio kun aranĝo de la trakoj kaj trakŝanĝiloj kiu permesas la realigon de cxiuj trak-tipoj ;
- reproduktas precize de la regadaparaton de ĉi-tiu instalaĵo.
- simulas fervojan procezon, inkluzive la realan movadon de la veturilaro tiel ke la laboranto akiru profesion sperton, tiel en la kondiĉoj de la normala interrilato de la centraliza instalaĵo kun la fervoja procezo, kiel, precipe, en la malnormalaj kondiĉoj determinataj de perturboj ĉe la instalaĵo, averioj ĉe la trako, kaj erara gvidado de la trajnoj kaj konvojoj.

La Sistemo SimCED estas koncipita kaj disvolvigita kiel reto de komputiloj. La komunikado estas certigita fare de programaro „W” inter komputilo sur kiu rulas la programaro „S” kaj pluraj komputiloj loka aŭ interrete konektitaj, sur kiu rulas la programaro „C”. Per la programaro S de simulado de la fervoja procedo, laboras la teamo de la instruistoj, kaj per la programaro C, de simulado de la CED (elektrodinamika centraliza) instalaĵo, laboras la personaro troviĝanta en la procedo de instruado ĉe komputilo.

La simulado de la CED instalaĵo estas totala. Sekve, la laborado simulata estas identa al la reala labormaniero:

- por la centralizaj-instalaĵoj de tipo CR2 aŭ CR3 ;
- por la reguligado de la cirkulado en simpla interstacia trako, sen blok-instalaĵo, aŭ kun instalaĵoj de tipo BLASR aŭ BLAS ;
- por la reguligado de la cirkulado en duobla interstacia trako, ekipita per aŭtomata traka bloko specialigita aŭ ambaŭsenca ;
- por la realigo de la cirkuladsekureco ĉe la niveltrapasejoj ekipitaj kun instalaĵoj SAT aŭ BAT, kun centraliza kaj loka regado.

Cele de la diverseco de la scenaroj, la simulilo ofertas al la instruistoj la eblecon krei iujn aranĝojn bazatajn sur kombinaĵoj de parametroj :

- la stacio estas ekipita kun diversaj tipoj de instalaĵoj ;
- kun kombinita regad-aparato aŭ kun apartigitaj lumskizo kaj manipulilo ;
- la cirkulado kaj manovrado en la stacio realiĝas kun antaŭdifinitaj rapidecoj ;
- la funkciigo de ĉiu trakŝanĝilo okazas per antaŭdifinitaj fortoj ;
- la tangenton de la trakŝanĝilo oni povas elekti el du valoroj, depende de kiuj la trajnoj cirkulas kun malsamaj reduktitaj rapidecoj sur la deviigitaj trapasejoj ;
- la vid-distanco de ĉiu signal-indiko povas esti fiksita malsame, kaj funkcie de la klimatkondiĉoj elektitaj komence de ĉiu instruadsesio, ĉi tiu estas konvene reduktita ;
- La trakoj kiuj ligas la simulatan stacion kun la tri najbaraj stacioj estas lokigitaj en tereno kun variebla deklivo.



RUMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO (R.E.F.A.)

500024 Braşov, str.Politehnicii nr.1, Rumanio

La trajnoj estas formataj el diversaj kargovagonoj, cisternovagonoj, malplenaj aŭ plenŝarĝitaj, trenataj de Diesel-lokomotivoj aŭ elektraj lokomotivoj. La persontrajnoj estas komponataj ĉu el pasaĝervagonoj trenataj de lokomotivoj ĉu el motorvagonoj.

La fizikaj ecoj de la veturiloj estas antaŭdifinitaj en la programaro kaj la movadon de la trajnoj kaj konvojoj oni simulas sur tiu bazo. En la trafikskemo la trajnoj estas ordigataj cirkuli sur diversaj rilatoj (celoj), kun diversaj rangoj, je diversaj tagmomentoj.

La instruadsesioj povas esti lanĉataj surbaze de diversaj aranĝoj aŭ sekve de antaŭaj sesioj. De sia pupitro la instruistoj povas kontroli samtempe 3-4 pupitrojn, kiuj simulas movadoficejon kie la instruatoj laboras kiel staciaj movadoficistoj.

La pupitroj de la instruatoj povas esti ĉu samloke, konektataj en unu loka reto, ĉu en aliaj lokoj, konektataj pere de la intereto.

Estas eble ankaŭ lanĉi lokan sesion, kie la instruisto laboras, li mem, ankaŭ kiel stacia movadoficisto, ĉu por la transdonado de la teoriaj konoj al pli larĝa aŭdienco, ĉu por la kreo de ekiraj sesioj cele de la posta simulata instruado.

Antaŭ la lanĉo de la sesio, oni metas je la dispono de la instruato raportojn generatajn de la simulilo rilate al la instalaĵoj kaj trakoskemo de la stacio en la ekspluata teknika plano de la stacio, rilate al la trafikskemo de la trajnoj kiuj cirkulos dum la periodo en kiu oni disvolvos la sesion, la komponon de la trajnoj kaj la manovran planon por lokaj kargotrajnoj.

En la sesio de simulata laborado, la instruato havas la eblecon realigi trakojn kaj cirkuladajn kaj manovradajn, agadi ĉe la regadpupitro de la simulata instalaĵo kiel en realo, por la gvidado de la cirkulado en la stacio kaj en la interstacia trako, tiel en normalaj kondiĉoj kiel, precipe, en kondiĉoj de perturboj ĉe la sekurecinstalaĵoj, inklude la permanan sekurigon de la trakŝanĝiloj sur la tereno pere kranko.

Krom la manipulado de la instalaĵoj, la simulilo permesas la ekzercadon de procedoj rilate al:

- la deĵorkomunikadoj ;
- la enskriboj en la registroj ;
- la cirkulado surbaze de skribaj ordonoj ;
- la asekurado de la vagonoj kontraŭ rulglitado, kaj aliaj.

La eventualaj operaci-eraroj estas registrataj en reala tempo kaj la noto estas aŭtomate kalkulata funkcie de la sumo de la akumulitaj pun-punktoj. La instruadsesioj estas malsame taksataj por komencantoj aŭ progresantoj, aŭ por la personaro periode ekzamenata kaj atestata.

Je la fino de la instruadsesio, por la analizo, la SimCED simulilo ofertas la eblecon redoni ĉiujn operaciojn realigitajn de la instruato tiel pere de „reludado” de la regad-aparato kiel ankaŭ pere de la listigo de ĉiuj operacioj kaj statŝanĝoj en la sistemo.

Simile, povas esti analizata la maniero de komunikado dum la sesio, pere de posta reaŭskultado de la telefonaj interparoladoj de la instruato kun diversaj personoj profesie koncernataj en la gvidado de la trafiko.



RUMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO (R.E.F.A.)

500024 Braşov, str.Politehnicii nr.1, Rumanio

La simulilo disponigas selektivajn raportojn rilate al la finita sesio, same kiel taksan raporton pri la simulita agad-maniero de la stacia movadoficisto.

La tuta simuladsistemo SimCED estas lokita en dediĉita spaco kie la pupitro de la instruistoj estas klare apartigita kaj la pupitroj de la instruataj laborantoj estas simile apartigitaj kiel trafikgvidad-oficejoj sendependaj, loke konektitaj. La mediokondiĉoj estas provizitaj pere de optimumaj temperaturo, prilumigo kaj komforto.

La videoprojekciado kaj la komunikado pere de ĝenerala sonorigada sistemo permesas la samtempan teoriantuadon de pluraj laborantoj.

La simuladsistemo SimCED estas moderna, efika kaj ebligas la postan ampleksigon per suplementaj manieroj de funkciado :

- por la samtempa simulata instruado por pluraj stacioj inkludataj en unu cirkuladsekcio.

- por la staciaj movadoficistoj kiuj laboras ĉe la pupitro de la elektronikaj centralizaj sistemoj.

- aŭ por la simulita instruado de la personaro kiu prizorgas tiujn sistemojn.

CENAFER, pere de la uzado de la simulilo, kreskigas la efikon de la instruadproceso, ebligas fundan profesionan trejnadon, inkluzive por malnormalaj situacioj kiuj, en reala situacio, aperas tre malofte.

Por la perioda taksado de la personaro la simulilo disponigas ĉiujn kondiĉojn por la disvolvado de iu ajn scenaro, kaj je la fino, la aŭtomata taksado, objektiva, montras la veran profesionan potencon de ĉiu dungito.

Eĉ pli, pere de la analizo de la aŭtomate arkivigitaj registraĵoj de la simulilo oni povas konstati la dumtempan evoluadon de la profesiaj kapablecoj de la personaro senpere koncernata en la kontrolo agado de la fervoja trafiko.

La multflankeco rilate al la adaptado je la specifaj kondiĉoj de funkciado de la centralizaj instalaĵoj uzataj de la fervojaj kompanioj, rilate al la lingvo en kiu oni konservas la arkivigitajn informojn, aŭ al tiu en la interfacado de la instruisto aŭ de la instruato, faras el la simuladsistemo SimCED gravan ilon en la instruado kaj en la perioda taksado de la fervoja personaro kun rektaj sekvoj en la certigo de la totala sekurecnivelo, ĉiam pli alta, deviga en la fervoja transporto en Rumanio, en Eŭropo kaj en la tuta mondo.

**La venonta IFEF Kongreso estos al Bordeaux (Francio)
4-11 Majo 2013**